

BRONISLAW PILSUDSKI.

## Nasko, gravedeco kaj aborto ĉe la loĝantoj de la insulo Saĥalin.

(Daŭrigo).

En la daŭro de kvin tagoj estas al la naskintino malpermesite kudri, kuiru aŭ iel labori kaj, se ŝi estas malsana, eĉ pli longe. En normalaj cirkonstancojn ŝi levigās la sesan aŭ sepan tagon kaj iom post iom ekokupas sin per sia ĉiutaga laboro.

Ankaŭ dum la puerperio Ajnoj estas tre atentemaj kaj ankoraŭ post la nasko daŭrigas la masaĝon. Por mildigi la dolorojn, ili metas en la rabotaĵon, per kiu ili frotas la korpon de la malsanulino, pecon da ursa utero aŭ denton de fera segilo aŭ denove masaĝas ŝin per trempita mara brasiko. Ĝenerale Ajninoj sentas post la nasko dolorojn en la ventro kaj uzas, por ilin eviti, diversajn rimedojn. Oni do fomentas la sakron de la malsanulino per seka, varmigita sablo en mallarĝa saketo, aŭ oni metas inter la femuroj varmigitan rabotaĵon de sambuko, ofte ŝanĝatan, aŭ surmetas sur la ventron varmitajn ŝtonojn, envolvitajn en la sama rabotaĵo aŭ iafaĵe en herboj.

Se la virinoj sentas dolorojn ĉe la puerperiaj eligaĵoj (loĥioj), ili trinkas infuzojn de diversaj herboj, kiujn ili nomas „arakojkina“ aŭ „o-kina“. Aŭ ili kuiras la herbon „simosineka“ (Lamium — falsan urtikon) kaj altan kreskaĵon, nomatan „hopenu kina“ kaj lavas per tiu ĉi varma dekokto la tutan korpon de la naskintino. Kiel tre efikaj estas konsiderataj pezaj koraloj, grandaj kiel kolombaj ovoĵoj, kiujn ĉiu familio gardas kiel trezoron kaj la naskintino devas porti dum la unuaj 4—5 tagoj post la nasko.

Por akceli la eligon de la placento, ili ĉirkaŭligas la ventron de la naskintino per mallarĝa borderaĵo, elŝirita el silka ŝtofo kaj la malsanulino mem enŝovas sian fingron profunde en la buŝon, kaŭzante tiamaniere vomojn; samtempe kun la vomoj eligas ordinare la placento.

La placenton kaj la membranojn, envolvitajn en mato, ili elportas el domo kien ajn, ne malproksime de la loĝataj domoj, farante tion post la subiro de la suno. Se tamen la virino naskis dam la nokto, oni povas elĵeti ĉi tiujn restaĵojn nur matene.

Bona rimedo, por revenigi la sanon al malfortigita virino estas, laŭ opinio de Ajnoj, branĉetoj de taksuso, per kiuj, forte ilin varmiginte, ili ĉirkaŭkovras la tutan korpon de la malsanulino.

La umbilikon de la infano ili detranĉas per ordinara tranĉilo kaj surŝutas la tranĉitan lokon per pulvorigita rivera konko, poste ili ĝin ĉirkaŭligas per peco da drapo. La umbiliko ĉiam normale kunkreskas kaj umbilikan hernion ĉe Ajnoj mi tute ne trovis.

La infanan kapeton Ajnoj dum la unuaj kvin tagoj rektigas per la manoj, kelkan fojon en la tago, ĉar alie, laŭ ilia opinio, ĝi fariĝas malbonforma; la kapo devas ja esti ronda supre, antaŭe kaj malantaŭe. Tion ili ankaŭ celas, rektigante la molan infanan kapeton. Krom tio dum la sama tempo ili fomentas la kapeton kaj precipe la verton per varmaj, molaj rabotaĵeroj lignaj.

La novnaskiton ili lavas jam la unuan tagon per varma, pura akvo sen ia almiksaĵo, pretigante nur por knabo akvon pli malvarman, kaj por knabino pli varman. Tenante la infanon super la planko en la maldekstra mano, ili verŝas la akvon po iomete el la vazo el betula ŝelo sur la korpon, frotante ĝin per la dekstra mano. Malpermesite estas verŝi akvon el la buŝo, kiel praktikas Gilakinoj, ĉar la infano povus pro tio ekmalsani je la okuloj.

Tuj kiam la infano nur estas envolvita en vindiloj, ĝi estas nutrita. La unuan tagon kutime mamnutras la novnaskiton alia virino, havanta ankoraŭ nutraĵon. Se tamen mankas tia virino, la patrino mem devas nutri la infanon. Se la lakto ĉe la puerperino longe ne montriĝas, ili metas sur la mamojn specialan bandaĝon el mola ŝtofo, subtenontan la ŝvelintajn kaj dolorantajn mamojn kaj ne allasontan troan malleviĝon kaj moviĝon, aŭ ili ŝmiras la mamojn per blanka suko, eliganta el la fibroj de la kreskaĵo, simila al kserantemo kaj nomata „to pie kara kina“ (lakton donanta herbaĵo). Virinoj, havantaj nesufiĉan lakton, ĉe Ajnoj estas eksterodinare malmultaj. Ordinare Ajninoj havas pli da lakto, ol estas be-

zone por la infano kaj mi oftete rimarkis, ke virino elpemis parton de sia lakto teren, aŭ nutris samtempe du infanojn.

Pri rupturo de perineo dum la nasko Ajnoj nenion aŭdis. Sed okazas, kvankam moloŭte, ke virino ne povas naski. Mi konis nur unu vidvon, kies edzino mortis pro tiu kaŭzo, ĉar helpi en tia malfellĉo ili absolute ne povoscias.

La zorgo pri sano de la naskintino ne ĉesas tuj post la nasko. Se la virino ne naskis en sia domo, sed ĉe konataj homoj kaj rapidas hejmen, ili ne ellasas ŝin el la domo antaŭ, ol pasis dek tagoj. Por ŝia forveturo preparas la mastro de la domo, en kiu ŝi gastis, molan rabotaĵon, per kiu li sternas la boaton aŭ la glitveturilon, destinitan por la forveturanta.

Komparante tion, kion mi aŭdis pri la nasko ĉe Gilakoj kaj Ajnoj, mi devas konkludi, ke Ajninoj naskas pli malfacile kaj kun pli grandaj doloroj ol Gilakinoj, malgraŭ ke la situacio de la Gilakinoj estas multe pli maloportuna dum la nasko mem, kiel ĝenerale, en la familia vivo. Unu el la konataj rusaj vojaĝistoj, kiu en la fino de la XVIII jarcento skribis verkon „Priskribo de la tero Kamĉatko“, dirante pri Ajnoj, loĝantaj sur la Kurilaj insuloj, rimarkas, ke la nasko de iliaj virinoj estas pli malfacila, ol ĉe la kamĉatkaj gentoj, ĉar laŭ la konfesoj de Kuriloj mem la resaniĝado daŭras ĉe ili po tri monatoj. En la jaro 1903 dum mia ĉeesto inter Ajnoj mortis kelkajn tagojn post la nasko 32 jara virino, kiu havis fortajn dolorojn jam antaŭ la nasko kaj dum la nasko falis en senkonscian staton. La infano vivis apenaŭ kelkajn tagojn.

Tamen koncerne la abortojn mi aŭdis de multaj viroj kaj virinoj de tiu ĉi gento, ke ili tre malofte okazas.

En la daŭro de du jaroj (1903 kaj 1904) mi persone skribadis precizan kalkulon pri ŝanĝoj en la loĝantaro de la orienta bordo de Saĥalino kaj notis en la jaro 1903 du abortajn kazojn kaj en la jaro 1904 nur unu kazon. Entute estis en tiuj ĉi du jaroj en tiuj vilaĝoj po 25 naskintinoj je 147 rilate 155 naskotaŭgaj virinoj, konsiderante kiel naskotaŭgaj virinojn de 15 ĝis 51 jaroj. En unu el la cititaj abortoj mi devis kiel kaŭzon konsideri sifilison de la patro; Ajnoj tamen ne scias, ke sifiliso ĉe unu de geedzoj kaŭzas aborton.

La rilatoj sur la okcidenta bordo de Saĥalino estas al mi malpli detale konataj kaj

eble tie abortoj okazas pli ofte, ĉar en la lastaj tempoj la loĝantaro de tiuj lokoj infektiĝas ofte per sifiliso de japanaj laboristoj, alveturantaj por fiŝkaptado.

Ajnoj mem klarigas la kaŭzon de abortoj laŭ jena maniero: 1. Se la edzo havas sur la peniso pustulon ne saniĝantan, oni ne konsideras tion kiel malsanon. Se la edzo ne kaŝas ĉi sian difekton, sed rakontas pri ĝi al la edzino kaj ŝiaj parencoj, tiam aborto ne okazos. 2. Se graveda virino falas kaj forte kontuziĝas, ŝi abortos.

Koncerne la regulojn por gravedaj mi devas antaŭ ĉio citi la ĝeneralan porskribon iradi dum la gravedeco kiel eble plej multe. Tiam la infano estos malgranda kaj la virino naskos sen fortaj doloroj. Ju pli proksima estas la nasko, des pli utila iĝas ofta moviĝado. Se male graveda virino tro sidas, la infano iĝas granda kaj la virino suferos kelkajn tagojn, antaŭ ol naski. Dum la gravedeco ili malpermesas manĝi la viandon de mara krabo, ĉar pro tio la ido povas havi buŝon disfenditan (lepora lipo), kiel la piedo de krabo. Oni ne devas ankaŭ manĝi viandon de ĉia birdaro, ĉar alie la infano havos okulojn strabajn kaj tiel same moviĝantajn, kiel ĉe birdoj. Tiel oni klarigis al mi unu kazon de lepora lipo ĉe virino el vilaĝo Najero kaj kaŭzon de strabaj okuloj ĉe du fratoj el vilaĝo Takoe.

Du monatojn antaŭ la nasko estas malpermesite al virino ŝpini fadenojn kaj tordi ŝnuretojn (el urtikaj fadenoj), ĉar ĉe la infano povas tiel same kunturniĝi la intestoj. La samo povus sekvi, se la graveda volus volvi fadenojn en bulon. Post sep lunaj monatoj graveda virino devas eviti oftajn seksajn rilatojn kun viro, ĉar la vira spermo povas eniri en la okulojn kaj buŝon de la infano kaj ĝi malbone vidos. Ili rakontas, ke okazadas ĉe novnaskitoj tiom da blanka muko (kiun ili same kiel spermon nomas „ovembie“) en la buŝo, ke oni ne povas sufiĉe rapidi purigi de ĝi la buŝon kaj la novnaskito mortas, sufokiĝinte per tiu muko. Post la nasko la rilato kun viro estas malpermesita dum la daŭro de 30—40 tagoj.

Rimarkinda estas la opinio de Ajnoj, ke gravedigo ne povas sekvi el unu aŭ dufoja koito; la infano estas rezultato de plifoja seksa rilato. Tial Ajninoj ne konsideras danĝera por si doni sin al viroj kaj timas nur sekvojn de pli longa amrilato.

(Fino sekvos).

Trad. Regino Fels.

## La paradizo de Mahometo.

Mi jam de longe deziregis eksenti la impresojn, okazigitajn per la uzado de haŝiŝo, ĉar diversaj allogaj priskriboj incitis altgrade mian menton. Dum mia studado de medicino mi ricevis pecon da ekstrakto de hinda kanabo aŭ „haŝiŝo“ kaj mi decidiĝis elprovi sur si la influon de ĉi tiu narkotaĵo, je kiu tiel emegas la popoloj de Oriento.

Preminte peceton de ĉirkaŭ du gramoj, mi maĉis ĝin bone, por ke la narkotaĵo, intermiksita kun salivo, povu pli rapide kaj pli forte efiki.

Post kvaronhoro mi eksentis, ke mia kapo peziĝas kaj la langa malobeemas. Tre scivola, kio plue sekvos, mi, ne seĉvestiginte sin, kuŝiĝis en la liton. La agrabla varmeco disvastiĝis en mia tuta organismo kaj, kiel ordinare en la momento de ekdormado, mi perdis antaŭe la konscion, kie kaj kiel kuŝas la membroj de mia korpo, tamen mi ne dormis, ĉar mi aŭdis, kion diris malantaŭ la muro la dommastro al sia edzino kaj la infanoj. Ĝi estis speco de facila dormeto. Ĉu mi longe dormetis, mi ne povas diri, sed certe kelkajn horojn, ĉar, kiam mi estis vekiginta, mi ekvidis tra la malfermita fenestro, ke jam noktiĝis. Jen antaŭ miaj okuloj komencis formiĝi ĉielarkaj ringoj, kiel okazadas, kiam oni alpremas per fingro aŭ kuseno la okulglobon, tamen tiuj ĉi rondoj ne malaperadis sed pli kaj pli kreskadis, pligrandiĝadis, kovris la tutan spacon antaŭ mi, formante diversspecajn kunligaĵojn kaj mirindajn multekolorajn arkajojn. Sur la arkajoj formiĝis kapituloj kaj subite stariĝis antaŭ mi palacoj de nekomporebla beleco. orumitaj, kvazaŭ iluminataj per la radioj de leviĝanta suno. La pejzaĝo estis rava. Sur smeraldaj herbejoj murmuretadis kristalaj torentoj, graciaj palmoj ekkreskis alte al la lazura ĉielo, ĉie oni vidis florojn en plej diversaj koloroj kaj formoj, kiajn mi ĝis nun neniam estis vidinta; ebriga odoro plenigis la aeron kaj birdoj kun plumaĵo, brilanta per diversaj koloroj de juveloj, transflugadis de branĉo sur branĉon, pepante volupte; super la floroj moviĝadis svarmoj de diverskoloraj kaj belegaj papilioj. Plej strange estis, ke tuj, kiam mi ekpensis pri iu bela konstruaĵo, kiun mi estis vidinta en mia vivo, ĝi desegniĝis antaŭ mi, formita el marmoroj, ornamitaj per turkisoj kaj superverŝita per mirinde bela kaj milda lumo. Kiel en kalejdoskopon pasis antaŭ miaj okuloj la puntsimile ellaborita turo

de la katedralo en Burgos, la maŭritana templo, aliigita je katedralo en Kordovo, la moskeoj de Marokko, la palaco de Alhambro kaj la mirinde belaj restaĵoj de temploj sur la „Forum Romanum“ kaj en la ĉirkaŭaĵoj de Neapolo. Iliaj harmoniaj linioj desegniĝadis mirinde pure sur la lazura fono de ĉielo kaj la suno ekflamiĝadis orecajn fajre-rojn sur ĉio, kio min ĉirkaŭis. Mi malfermadis larĝe okulojn, por konvinkiĝi, ke tio, kion mi vidas — mi vidas maldorme kaj ne dorme. Mi ne dormis, ĉar mi laŭvole kreadis vidaĵojn, konvinkiĝinte, ke ĉion, pri kio mi nur estos ekpensis, mi tuj ekrigardos tiel beligitan, kiel nur la plej brila imago povas ĝin fari.

Kia domaĝo, mi ekpensis, ke al ĉi tiuj mirindaj vidaĵoj ne aliĝas muziko. En la sama momento, kiam tiu ĉi penso ekfulmis en mia kapo, mi ekaŭdis el malproksime la sonojn de alproksimiĝanta kapelo, kiu ludis mian amatan marŝon el „La Profeto“. Kiam la eĥo de la finalo komencis malfortiĝi, formiĝis el la malaperantaj ie en malproksimo tonoj la polonezo de Chopin. La tonoj kuniĝis, potenciĝis, alproksimiĝis kaj atingis forton, neniam ankoraŭ de mi aŭditan. Tiu ĉi nevidebla muziko mem prezentiĝadis en iaj ĉielarkaj koloroj. La ĥoroj alternadis kun solistaj kantoj, mirinde dolĉaj, kunfandiĝantaj kun la sono de citroj ĉu liutoj, unuvorte ĝi estis miraklo muzika, pri kiu mi neniam eĉ revis.

Post momento mi ekdeziris aeron kaj spacon kaj tuj, kiam ĉi tiu deziro ekfulmis en la kapo, mi ekvidis grandan lazuran riveron, surdesegnitan per blankaj strioj de ŝaŭmo. Mi vekigis sur oreca boato, el kies mastoj pendis silkaj veloj. Ĉie flugpendadis flagetoj, brilantaj per diversaj, ĉielarkaj koloroj. Sur la bordoj staris belegaj portikoj. Gigantaj kreskaĵoj kovris la radikojn de grandegaj palmoj kaj figuoj, kreskantaj ĉe la bordo de la rivero, mirindaj reĝinoj de riveregoj Missisipi kaj Amazono, ferminte siajn rozajn kalikojn balanciĝadis sur la malpezaj ondoj. Diverskoloraj krizantemoj, kiel multekostaj juveloj, pendis malsupren de kolosaj arboj de ĉi tiu paradiza regiono, meze de kiu mi naĝis. Mirinda aromo de violoj kaj sambuko plenigis la aeron kaj karesis la flarsenton. Mi enspiradis per plena brusto tiujn ĉi diversspecajn odorojn kaj enspirante, mi notis en la memoro la impresojn — do mi ne dormis. Mi efek-

tive estis en ĉi tiu momento Sardanapalo. Kiam la pensado subŝovis al mi rememoron pri ia manĝaĵo, mi tuj sentis ĝian guston, mi sentis, kiel agrable ĝi tiklis la palaton, kiel bonege ĝi estas farita. Ĝi mem fluis en la buŝon, ne trosatigante kaj ne naŭzante per unuformeco. Mi manĝis nekonatajn al mi sudajn fruktojn, mi trinkis mirindajn nektarojn, mi rigardis ĉarmegajn disvolviĝantajn antaŭ mi, ĉiam pli novajn formojn de naturo kaj arto, mi aŭskultis mirigan, neniam aŭditan melodion de tonoj. Ia neesprimeble ĝuega sentaĵo plenigis tutan mian estajon.

Poste miaj revoj transportis min en bildgaleriojn, en skulptartajn muzeojn kaj tuj starigis antaŭ mi la monumentoj de Praksiteles, Cellini, Canova en tuta pompo kaj formĉarmeco. Kvazaŭ per elektra lumo surverŝitaj, pasis antaŭ mi diversaj belulinoj, jen allogante per volupta rideto, jen imponante per seriozeco kaj majesteco aŭ per beleco kaj ĉarmo. Mi vidis Virginia'n, pro kiu perdis la tronon Tarkvinius fiero, mi vidis Veturia'n, la belan edzinon de Koriolano kaj seriozan Kornelia'n, la patrino de Grachoj kaj voluptecan Poppea'n Sabina'n, la edzinon de Nero, Beatriĉa'n Cenci, Vanda'n, reĝinon Jadviga'n, Kleopatra'n kaj ĉiujn belulinojn, kiujn mi iam ajn estis renkontinta en vivo aŭ vidis sur la bildoj. Tiuj ĉi aperaĵoj malaperadis unu post alia en diafana nebulo. Mi estas certa, ke mi tiam ne dormis, ĉar la pensoj ripetadis al mi senĉese: pririgardu bone tiujn ĉi historiajn personojn, ĉar vi ilin jam plu ne vidos.

Ĉu tiu ĉi stato longe daŭris — mi ne scias, sed ŝajnas al mi, ke mi ekdormis meze de revoj, ĉar ĉio malaperis, kiam mi estis revekiĝinta. Mi rigardis ĉirkaŭen: ne ekzistis eĉ postsigno de tiuj belaj vidaĵoj, kiujn mi antaŭe vidis. Unuaj radioj de mateniĝo enrigardis la fenestrojn de la ĉambro kaj ĉarma preĝo de alaŭdo sur la kampo sonis en la aero. La nudaj muroj kaj la ordinara malordo de fraŭla ĉambro faris malagrablan kontraston kun tio, kion mi antaŭ momento estis sentinta kaj vidinta. Mia stato estis stran-

ga. Malgraŭ mia nedormado mi povis movi nek manon nek piedon.

Ŝajnis al mi, ke mi perdis la korpon kaj ke mi vivas nur per pensoj. Tia estas certe la senmorteco de nia animo — mi ekpensis, ĉar mi scias, kio estis kaj kio estas, sed mi ne posedas la teran kovraĵon, ĉar mi ĝin ne sentas.

Subite sendepende de volo mi ekmoviĝis, mi leviĝis el la lito kaj direktis min al la fenestro. Kial? Por kio? Mi ne sciis, sed mi ne havis fortojn, por deteni mian movadon. Timante, ke mi ekdeziros elsalti el la fenestro de la dua etaĝo, mi streĉis la volon, por ne iri pluen, kaj tamen mi iris. Mi volis ekkrii je helpo, sed mi ne povis eligi el la gorgo ian voĉon. Mi sentis en mi du estaĵojn — unu, kiu volas ion kaj povas ĝin atingi, duan, kiu ne volas, sed ne povas subpremi la unuan. Tian strangan staton, tian disecon de la volo, mi neniam spertis, nek maldorme, nek eĉ dorme. La imago prezentis la tutan danĝerecon de alproksimiĝo al la malfermita fenestro je la dua etaĝo, ĉar ĝi ne sciis, kion intencas tiu mia dua „mi“. Mi sentis, ke la frunto kovriĝis per malvarma ŝvito. Alproksimiĝinte al la fenestro mia dua, senkonscia ekzistaĵo enverŝis glason da akvo el karafo, tie staranta, trinkis kaj poste revenis en la liton por granda kontentigo de la unua parto.

Post momento mi ekdormis denove kaj vekigis, kiam la suno jam staris alte. La tuta korpo estis kvazaŭ frakasita, malforta, laciĝita, la kapo doloregis; en la buŝo mi sentis malagrablan guston, kiel se mi estus englutinta ian abomenegaĵon; naŭzis min — unuvorte mi estis venenita.

Kelkaj glaŝoj da freŝa lakto elvokis vomadon kaj poste eksterordinaran malfortecon, kiu daŭris ĝis la sekvinta tago, kiam mia fortika naturo estis venkinta la ruinigantan efikon de la danĝera narkotaĵo. Belaj estis la vidaĵoj, sed pli bela estas la sano, kvankam ne en tia mirinda ĉirkaŭaĵo kaj kun tiel agrablaj impresoj.

*Esperantigis*

*Artur Adler.*

---

---

## HUMORAĴOJ.

D-ro Jebb, tre ŝatata londona kuracisto, kuracis unu lordon dum lia malsano. Li atendis po kvin gvineoj por ĉiu vizito, sed ricevis nur po tri. Li suspektis, ke la domoficisto, kiu al li la honorarion donadis, iom de la mono kaŝadis por si, tial li volis en delikata maniero pri tio certiĝi. En ĉeesto de la lordo li intence lasis fali la donitan monon. La servantaro, levinte ĝin, redonis la monon

al la kuracisto, sed li, ĉiam ankoraŭ serĉante, prigardadis la plankon. Tion rimarkante, la lordo lin demandis: „Ĉu al vi ankoraŭ io mankas?“ „Ankoraŭ du gvineoj“, respondis la doktoro, „mi havas nur tri“. La lordo, kiu donadis al li nur tri gvineojn, kiel kuracistan honorarion, komprenis ĉi tiun aludon kaj Jebb ricevis aldonan honorarion po du gvineoj por ĉiu vizito.